

Nro 2.

# POLA ESPERANTISTO

dumonata

organo de Societo „Esperanto“ en Lvovo.

Oktobro 1906.

1. Jaro.



## Treŝe:

Co moŝe poviedzieĉ lekarz  
(*Dr. Br. Skalkowski*).  
Ruch esperantystyczny.  
II. Kongres esp. w Genewie.  
Kronika.  
Esperanto a Volapük (*St. Schels*).  
Podwójnie zrujnowany (*H. Hempel*).  
Rozmaitości.  
To i owo.  
Od Redakcyi.  
Fejleton: Wschodnia idylla (*St. Łazica*).



Numer pojedynczy 30 h.

## Enhavo:

Kion povas diri kuracisto  
(*Dro Br. Skalkowski*).  
Esperantista movado.  
II. Kongreso esp. en Genevo.  
Kroniko.  
Esperanto kaj Volapik (*St. Schels*).  
Duoble ruinigito (*H. Hempel*).  
Diversaĵoj.  
Miksaĵoj.  
De la Redakcio.  
Feliĉetono: Orienta idilio (*St. Łazica*).



Unu numero 30 h.

REDAGUJE  
KOMITET.

Jara abono:  
en Austrio . . . 1.80 h.  
en Eksterlando . 2.50 fr.  
kune kun sendspezoj.

REDAKTATA --  
DE KOMITATO.

Nakładem Towarzystwa „Esperanto“ we Lwowie.



## Literaturo.

**Gawalewicz** — Lasta ankunveno.

**Goete** — Elforeĝo.

Gefratoj.

**Gomulicki** — Kion ne komprenas la hirundoj kaj papilioj.

**Hajota** — La floroj de l' malfideleco.

**Helne** — En nord unu pino.

En songo.

Lorelej.

Rugobuŝa knabineto.

Saluto de l' maro.

Sklaveŝipo.

**Herder** — Infano de sorgo.

**Homer** — Iliado I—IV ks.

**Junosza** — La flikisto.

**Konopnicka** — Al la virino.

Mia onklino.

**Koroleńko** — Fantomoj.

Paska nokto.

**Kraŝiński** — Al la virino.

**La Fontaine** — Fabeloj elektitaj.

**Leibnitz** — Monadologio.

**Lermontov** — Anĝelo.

Aŝik Kerib.

Demono.

Mi eliras.

Profeto, Tri palmoj. Velo.

**Mickiewicz** — Fragmento.

Sinjorino Twardowska.

Tri Budrisoj.

Vojevodo.

**Moliere** — L' avarulo.

Edziĝo kontraŭvola.

**Niemojowski** — Kapreolineto.

**Ochorowicz** — La esenco de la ekzisto.

**Odyniec** — Demando.

**Orzeszko** — Interrompita kanto.

Legendo.

**Perrault** — Rakontoj pri feinoj.

**Prus** — Ĉu ŝi amas aŭ ne amas.

El la legendoj de antikva Egiptujo.

Nova jaro.

Ombroj.

Ŝimo ge l' mondo.

**Puŝkin** — Borys Godonov.

Husaro, La neĝa blovado. Ŝtona gasto.

Mocart kaj Saljeri.

**Reymont** — En la profundaĵoj.

**Schiller** — Espero.

Garantio.

**Shakespeare** — Hamleto.

Ventego.

**Slonkiewicz** — Ĉe la fonto.

Du herbejoj.

Estu benata.

Janko Muzikanto.

Jugo de Zeuso.

Komedio el eraroj.

Lanternisto.

**Sieroszewski** — Fundo de l' mizero.

Ofere al la dioj.

**Stowacki** — En Svisujo.

Mi malĝojas Sinjoro.

Patro de l' pestuloj.

**Szymański** — Sruel el Lubartov.

**Tetmajer** — Fabelo.

**Virgilio** — Encido I—II cz.

**Żeromski** — Sur la ferdeko.

**Żmichowska** — Sorĉrondo i t. d.

## Leterkesteto.

Ni malfermas ĉi tiun konstantan rubriketon por tie ĉi respondadi diversajn demandojn de niaj legantoj, kiam ili ne alsendis poŝtmarkojn aŭ kiam la respondo povas interesi ankaŭ aliajn gelegantojn.

**Dem. 1.** Ĉu ekzistas lernolibro de esperanta stenografio, kie ĝi estas aĉetebla kaj kiom ĝi kostas?

**Resp. 1.** Ekzistas jam kelkaj lernolibroj de esperanta stenografio kaj pluaj laŭ diversaj sistemoj estas pretigataj -- sed ĝis nun estas la plej bona tiu, kiun eldonis Sro Schneeberger, redaktoro de esperanta stenografia gazeto „flugila Stelo“. Vi povas ĝin aĉeli per pero

de nia Societo. Prezo 1 K, afrankite 1 K 05 h, rekomendite 1 K 30 h.

**Dem. 2.** Ĉu la redakcio konas samideanojn, kiuj ne havante tempon kunveni en societejo por ekzerci en buŝa interparolado, volus eble letere aŭ poŝtkarte korespondadi kun izolitaj esperantistoj?

**Resp. 2.** Ni konas nur unu, kiu tre multe korespondas, sed nur kun alilandanoj. Eble niaj legantoj, traleginte tion ĉi, helpos al ni, alsendante siajn adresojn, kiujn ni represos por tiamaniere plifaciligi la ekkonon de personoj dezirantaj korespondadi.

## Prosimy pamiętać o wkładkach kwartalnych!

**Warunki przystąpienia do lwowskiego Tow.**

„Esperanto“:

We Lwowie 50 h. (wpis.) i 2 K kwart. (wkładka)  
Na prowincyi 50 h. (wpis.) i 1 K kwart. (wkładka)

P. T. Studenti płać połowę.

**W Redakcyi „Pola Esperantisto“**

można zamawiać wszystkie dzieła i  
pisma zagraniczne.



# POLA ESPERANTISTO

Esperantaj sciigoj por pollingvanoj.

Oktoebro 1906.

Redakcio kaj Administracio: Lvovo (Ossolińskich 13).

1. Jaro No. 2.

## Co może powiedzieć lekarz...

Co może powiedzieć lekarz, który znalazłszy się przypadkowo na lekcyi nieznanego przedtem całkiem dla niego języka, po niespełna dwóch miesiącach, publicznie zabiera głos o tym przedmiocie. Być może, iż moją pedantyczną naturę dotknęła przyjemnie ta prosta i precyzyjna budowa gramatyki. Przedewszystkiem niema wyjątków — podczas gdy przeciwnie w naszym życiu nic nie dzieje się bez wyjątków; na każdym kroku nieregularności — tak w publicznem życiu, jak w prywatnem a szczególnie w naszych zawodach. W mojej młodości, aczkolwiek zawsze marzyłem, by zostać lekarzem, zajmowała mnie, poza wstrętnymi wyjątkami łaciny i greki, matematyka, która bardzo dobrze odpowiadała mojej pedantycznej naturze.

Sposób tworzenia słów w Esperancie przypominał mi moje młodzieńcze zajęcie. A ponieważ według fizyologa sp. Brückego istnieją t. zw. »Ausgelaufene Bahnen«, znalazłem, iż dla mnie, który już zapomniał o matematycznych regułkach, zajmowanie się nowym językiem, nie znającym wyjątków byłoby nową przyjemnością może nawet korzystną.

Wracając po wykładzie do domu, kupiłem po drodze gramatykę i słownik. Wieczorem po zawodowym zajęciu wziąłem je w rękę i już po kilku dniach mogłem poznać gramatyczne reguły, tłumaczyć i rozumieć tekst nawet na ostatnich stronicach ćwiczeń. Przekonawszy się, iż języka można się nauczyć bardzo łatwo nawet bez pomocy nauczyciela, zacząłem się systematycznie uczyć. Esperanta bowiem, jako języka musi się koniecznie uczyć! Z początku natrafi uczący się także niezrozumiałości i trudności i może nawet zada pytanie, dlaczego na przykład »hundo«, »ferdeko«, »forgeso« nie są nazwane »kano«, »poklado« »oublio«? Tymczasem, jeżeli się dokładniej bada Esperanto, wtedy poznaje się genialną, logiczną, matematyczną budowę tego języka.

## Kion povas diri kuracisto...

Kion povas diri kuracisto, kiu sin trovinte okaze en la leciono de nekonita antaŭe por li lingvo — post du neplenaj monatoj publike voĉprenas pri tiu ĉi afero. Eble mia pedanta naturo estis tre agrable tuŝita de tiu simpla kaj preciza konstruo de l'gramatiko.

Antaŭ ĉio neniam esceptoj, — dume kontinue en nia vivo nenio okazas laŭ la regulo, sur ĉiu paŝo neregularaĵoj, en publika vivo, en privata kaj precipe en niaj metioj, ĉie esceptoj. Dum mia juneco kvankam mi ĉiam revis esti medicinisto, okupis min ekster abomenaj latinaj kaj grekaj esceptoj, matematiko, kiu tre bone konvenis al mia pedanta naturo.

La esperanta vortfarado rememorigis min pri mia antaŭa, junaĝa okupo. Kaj ĉar ekzistas laŭ fiziologo mortinta Brücke, tiel nomataj »Ausgelaufene Bahnen«, mi trovis, ke al mi kiu, forgesis jam matematikajn regulojn, okupado je nova lingvo, ne konanta esceptojn, estus nova plezuro kaj eble profita.

Revenante post la leciono hejmen, mi aĉetis dumvoje gramatikon kaj vortaron. Vespere post metia okupo mi prenis ilin en manojn kaj post kelke da tagoj mi povis jam — konante gramatikajn regulojn — traduki kaj kompreni tekston eĉ sur lastaj paĝoj de l' ekzercaro.

Konvinkiginte, ke la lingvon oni povas ellerni facilege eĉ sen helpo de instruisto, mi komencis sisteme lerni. Ĉar esperanto — kiel lingvo devas esti nepre ellernata. Komence la lernanto trovas ankau malkomprenajojn kaj malfacilaĵojn kaj eble li faros al si demandon, kial ekzemple »hundo« »ferdeko« »forgeso« ne estas nomitaj »kano« »poklado« »oublio«? Dume, se oni pli precize esploras Esperanton, oni ekkonos tiam genian, logikan, matematikan konstruaĵon de ĉi tiu lingvo. Se oni iom dubas pri iuj da uzitaj radikoj, oni pripensinte kovinkigos, ke Dr. Zamehof,



Jeżeli się wątpi nieco o niektórych z użytych źródłosłów, to zastanowiwszy się, przychodzi się do przekonania, że Dr. Zamenhof, twórca tego języka nie mógł innych źródłosłów użyć. Bogactwo tego języka jest według mego zdania niewyczerpane a mimoto jest język bardzo łatwy. Jeżeli ja, Polak dam Japończykowi matematyczne zadanie do rozwiązania, — to on uczyni to — naturalnie znając reguły; tak samo każdy, znając kilka gramatycznych reguł przetłumaczy przy pomocy małego słowniczka tekst esperancki i zrozumie myśl. Oprócz tego, według mego zdania, nie może się zrodzić większa i wspanialsza idea, niż ta, która ma zbliżyć i sprowadzić — poza ojczystymi językami — łatwe porozumienie się wzajemne. Taką ideę miał już Leibnitz, który chciał stworzyć ideologiczny sposób pisania; np. i teraz japończyk może przeczytać chińskie pismo lecz ustnie jeden drugiego nie rozumie. Taką samą ideę miał Schleyer. Tu można powiedzieć: »idea była wielka — tylko wykonanie złe, — i dlatego Volapuk upadł. Nidzwyczajne szerzenie się »Esperanta« dowodzi, iż tylko jedynie jego podstawa jest racjonalną i mającą wydać w przyszłości owoce. Ja sam tylko z ogłoszeń i tytułów tłumaczeń widzę, iż ruch esperancki rozszerza się szybko, zwłaszcza w Francyi i Anglii, która może najprędzej mogłaby żądać, by jej język panował w całym świecie. Boję się jednak, by do Polaków, wśród których urodził się Zamenhof, nie powiedział kiedyś kto, co powiedział już mistrz Pol: »cudze chwalicie, swego nic znacie; sami nie wiecie, co posiadacie«!

Wiadomem jest, iż w Anglii zaprowadzono Esperanto, jako przedmiot obowiązkowy w szkołach handlowych i podlegający egzaminom. Nie jestem prorokiem i co przyniesie przyszłość, nie wiem — lecz mam przekonanie, iż Esperanto jest już teraz bardzo ważnym środkiem do wzajemnego porozumiewania się — i gdyby się nim nawet nie stało w przyszłości, — to zawsze zajmowanie się nim będzie o wiele lepszą zabawą, niż gra w karty lub jakiegokolwiek inne nierozsądne i bezmyślne tracenie drogiego czasu. Tak samo zdaje mi się, iż jeżeli kiedyś Esperanto stanie się ogólnym, wszechświatowym sposobem porozumiewania się, jak obecnie telegraf i telefon — swojego czasu zapoznawane i wyśmiewane przez urzędowych mężów wiedzy — ci będą ostatnimi, którzy dorzuca cegiełkę do gmachu, w którym się ludzkość

kreinto de l' lingvo ne povis uzi alian radikon.

Riĉeco de tiu lingvo estas laŭ mia opinio ne elĉerpebla kaj malgrau tio estas la lingvo tre facila.

Se mi, polo donos al japonso matematikan problemon por dissolvo, li faros ĝin — nature, konante, regulojn, same — ĉiu konante kelkajn gramatikajn regulojn tradukos, kun helpo de l' malgranda vortareto esperantan tekston kaj komprenos sencon.

Krom tio laŭ mia opinio ne povas naskiĝi pli granda kaj eminenta ideo ol tiu, kiu la homaron kunproksimigos kaj katizos — ekster la naciaj lingvoj — facilan interkomprenigon.

Tian ideon havis jam Leibnitz, kiu volis krei ideologikan skribarton; ekz. kaj nune la japonso povas legi ĥinan skribaĵon, sed buŝe unu alian ne komprenas. Saman ideon havis Schleyer. Tie ĉi oni povas diri: »Die Idee war gross, die Ausführung schlecht« kaj tiel la volapiko falis.

Eksterordinara disvastigado de l' »Esperanto« pruvus, ke nur ĝia bazo estas sole racia por fruktoportonta estonteco.

Mi mem nur el sciigoj kaj titoloj de tradukaĵoj vidas, ke la esperantista movado disvastiĝas rapide, precipe en Francujo kaj Anglujo, kiu eble povus postuli, ke ĝia lingvo estu la tutmonda.

Mi timas tamen, ke al la Poloj, inter kiuj naskiĝis la kreinto de l' lingvo »Esperanto«, Zamenhof, oni povus iam diri, kion jam diris la Majstro Pol: »fremdan vi laŭdas propran ne konas; Vi mem nescias, kion vi posedas«.

Sciante estas, ke en Anglujo oni enkondukis esperanton en komercajn lernejojn kiel objekto oficialia kaj ekzamenata.

Mi ne estas la profeto kaj kion alportos la estonteco, mi ne scias, sed mi havas la konvinkon, ke l' Esperanto jam nune estas utiliga ilo de l' reciproka interkomprenigo, kaj se ĝi eĉ en la estonteco ne fariĝus — ĉiam okupado je esperanto estas pli bona ludilo ol kartludoj aŭ ia ajn nesaga kaj senscia perdado de l' kara tempo.

Same ŝajnas al mi, ke, se iam Esperanto fariĝos ĝenerala, tutmonda komprenigilo, kiel nune estas telegrafo kaj telefono, — siatempe malŝatataj kaj elridataj de »oficialaj scienculoj«, tiuj ĉi estos la lastaj, kiuj almetos la brikon al konstruaĵo, kie la



zblizi, zrozumie i przestanie być »h o m o h o m i n i l u p u s«.

Z tych »urzędowych uczonych«, którzy nie starając się sprawy zbadać — według sentencji »Roma locuta, causa finita« — wiele użytecznych idei naprzód rozsądzi — złożywszy je z paradą w grób zapomnienia, — nie jeden dożyje chwili, by zobaczyć ową ideę powstającą na nowo z grobu i zajmującą należne jej miejsce w cywilizacyjnej zdobyczy ludzkości.

Może i teraz to »oficyalne, grono uczonych« śmieje się z praktycznego lekarza, który poza swoim zawodowym zajęciem — nie mając złotego kołnierza — znalazł odwagę zajmowania się nową ideą — tak samo, jak śmiano się z Dra Semmelweisa, twórcy aseptyki, dobrodziejstwa ludzkości — lecz poczekajmy nieco — a przyszłość pokaże nam, kto miał słuszność.

*Dr. Br. Skatkowski.*

homaro sin interproksimigos kaj interkom-prenigos kaj ĉesos esti »homo hominilupus«.

El »oficiala instruitularo«, kiu ne peninte la aferon ekesplori — laŭ la sentenco »Roma locuta, causa finita« multe da utilaj aferoj antaŭdisjugis, portinte ilin kun granda parado en tombejon de l' forgeseco, neunu iam ĝisatendos vidi tiun ideon renove ekstarigi el ĉerko kaj en triumfa marŝado repreni ĝian indan lokon en civilizacia akiro de l' homaro.

Eble kaj nune »la oficiala profesoraro« ridetas pri praktika kuracisto, kiu ekster la metia okupado — ne havante oran kolumon, kuragiĝis sin okupi je nova ideo, same kiel oni ridetis pri Dro Semmelweis, kreinto de l' aseptiko, bonfaraĵo de la homaro, sed ni atendu iom, kaj estonteco elmontros al ni, kiu estis prava.

*Dr. Br. Skatkowski.*

## Esperantista movado.

*Algerio.* La komerca sindikato de l' urbo Algerio oferis cent frankojn por la tiea esperantista grupo. La laborista sekcio de esperantista grupo kunligis kun samaj anglaj por eldonado de laborista esperanta ĵurnalo.

*Anglujo.* La internacia kongreso de oficistoj (Londono) alprenis jenan decidon:

„Konsiderante, ke la kono de fremdaj lingvoj fariĝis necesega al la oficistoj; ke tiu kono postulas fervoran studon, kiu malhelpas la akiron de tiuj lingvoj; ke la internaciaj rilatoj celadas vastigi pli kaj pli; kaj ke estus tre utile alpreni komunan helpan lingvon, kiu forigus la grandan malŝparon de tempo kaj la lacecon, kaŭzatajn de l' tradukoj en la internaciaj kunvenoj;

„La kongreso esprimas jenan deziron:

„Ke Esperanto estu akceptata kiel oficiala lingvo en ĉiuj estontaj internaciaj kongresoj; ke la diversaj federacioj partoprenantaj en la Londona kongreso agu kiel eble plej energie, por ke iliaj registaroj enskribu Esperanton inter la lingvojn instruotajn en la unua-kaj dua-gradaj lernejoj; k. t. p. Tiu ĉi decido estis akceptita unuvoĉe.

La plej grava komerca lernejo en norda Anglujo, la „Northern Institute of Languages“ decidis instrui senpage Esperanton. Enskribis sin 63 lernantoj. Oni uzas fonografon.

En Londona St. Bride Institute efektiviĝis esperantista festeno kun dancado, kantoj kaj deklamado. Aliaj festoj okazis en Eg-ham, Glasgovo, Deal, Manchester. Koncerto esperantista estis en Plymouth.

La grupo en Keighley arangas esperantan kurson en la teĥnika lernejo kaj ricevas por tio monan helpon de la registraro; ĝiaj ekzamenoj havos oficialan valoron.

„The Northern Freemason“ sciiĝas, ke Esperanto tre disvastiĝas inter la framasojn.

La antaŭ nelonge fondita Londona Poliglota Club jam alprenis lingvon Esperanto en programon de kursoj.

Novaj grupoj fondiĝis en Longborough, Gimsby, Goole, South-Sheffield, Nord-London, Hull, Burnley, Bartley kaj Kardiff.

Konsiderante, ke la Brita esperantista societo konsistas el pli ol 60 grupoj, oni povas konstati kun ĝojo, ke nun Anglujo okupas post Francujo duan lokon en Esperantistujo. Tiu ĉi fakto estas plej bona respondo al niaj kontraŭuloj, kiuj ofte diras, ke nur romanaj popoloj entuziasmiĝos je Esperanto kaj, ke speciale Angloj neniam ĝin akceptos.

*Aŭstralio.* Dua esperantista grupo fondiĝis en Brisbane.

*Aŭstrio.* En Klein-Augezd Sro Sattler arangis esperantistan ekspozicion. Novaj



grupoj fondiĝis en Merseburg. La fame konata Viena librejo Hartleben eldonis grandan esperantan lernolibron verkitan de Sro Schröder, prezidanto de l' tiea klubo.

**Belgujo.** La ministro de instruado intencas enkonduki Esperanton en lernejojn. Nova grupo fondiĝis en Huy. Oni legas kursojn en Mamur en la komerca lernejo, en Antverpeno, Kortrijko kaj aliaj urboj.

**Brazilujo.** En Campinas kaj Porto Alegre fondiĝis esperantistaj grupoj.

**Bulgarujo.** Universala komerca domo fondiĝis en Filipoplo sub firmo: Oreskov kaj ko. En Ŝumeno oni aranĝas esperantan ekspozicion.

**Ĉilio.** En Santiago samtempe tri kursoj estas legataj.

**Danujo.** Sro Skeel-Giorling fondis esperantistan grupon en Kopenhago.

**Finlando** Nova grupo „Polusstelo II.“ fondiĝis en Viipuri kaj alia en Nurmijarvi. La Tammerforsa grupo eldonas gazeton.

**Francujo.** Ĉe la Pariza esperantista grupo oni fondis apartan industrian kaj komercan sektion, kies celo estas senpage doni ĉiujn koncernantajn sciigojn al similaj eksterlandaj esperantistaj grupoj kaj komercistoj.

En sama urbo fondiĝis „Tutmonda labora societo“ (Amika unuiĝo de l' esperantistaj geoficistoj kaj gelaboristoj).

En Bulonjo sur Maro okazis la 23. VI. 1906 je l' honoro de la ordenigo de Dro

Zamenhof per la Honora Legio granda vesperkunveno k n koncerto, kantoj kaj monologoj.

La „Centra Oficejo“ aranĝas ĉiusemajne „tean vesperon“.

Esperantistaj festoj okazis en Parizo, Beziers, Charenton, Sotteville les Rouen (700 ĉeestantoj), Lyon kaj Angers.

Sro leutenant Bayol propagandas kun sukceso nian lingvon en Societo de Ruĝa Kruco inter oficiroj kaj soldatoj.

Estas neeble citi ĉiujn lokojn, en kiuj novaj grupoj estis fondiĝintaj. Ĉar ilia nombro kreskas kiel fungoj post pluvo. Tiu movado estas tiel grandega, ke jam kelkaj membroj de parlamento penadas enkonduki Esperanton anstataŭ la naturajn lingvojn en ĉiujn lernejojn.

**Germanujo.** En Brunsvigo dum la lastaj tagoj de majo kunvenis reprezentantoj de ĉirkaŭ 20 esperantistaj germanaj grupoj kaj fondis „Germanan esperantistan Societon“, kies celo estas kunligi la fortojn de apartaj grupoj, por pli rapide, per pli grandaj monaj rimedoj kaj komuna ĵurnalo propagandi kaj disvastigi Esperanton. La membroj pagos jaran kotizaĵon 3 M kaj ricevos senpage „Germanan Esperantiston“, kiu fariĝis centra organo de ĉiuj germanlingvaj esperantistoj. En tiu ĉi urbo fondiĝis internacia komerca esperanta societo „Progreso“, kiu jam kelkaj semajnoj poste trovas ĉirkaŭ 200 membrojn kaj sukcesis gajni por siaj

## Orienta idilio.

Ek estis junulo bona, belkreska kaj ĉasta. Li portadis flavan vestaĵon de parso<sup>1)</sup>, ĉar li ĵus en silenta monaĥejo de Budda fundesploradis la saĝan komprenigon de Gaŭtama. Pensoj de saĝulo, kiujn li senĉese memoris ne unufoje vekadis en lia animo iajn duoneksentitajn duonkomprenitajn tonojn. Post longaj horoj laboraĵ li iradis ien, malproksimen, en kamparon kaj tie en ombro de branĉoriĉa palmo eligadis mallaltajn, fluantajn el koro kantojn. Neniu el homoj aŭdis lin tie — li kantis por gajaj birdetoj — por verda herbaro — kaj por blua ĉielo, konfidulo de poetoj.

Unu tagon al tiu malproksimejo de l' poeto okaze alproksimiĝis juna virgulino Theau. Ekaŭdinte mirindajn sonojn de l' kanto ŝi sidigis enaŭdiganta sur bordon de apuda

rivereto... Poste ŝi venadis ĉiutage, ne alproksimiĝadis tamen Theau al juna kantanto, de malproksime nur ŝi penis tra arbata densaĵo ekvidi inspiritan vizaĝon de poeto.

Sed unufoje, puŝita de subita decido, ŝi eliris el kaŝejo kaj alproksimiĝinte al Ek'o, ŝi diris per tremanta voĉo:

Se vi ne estas la dio Ŝiva, kiu deiris de bluaĵo ĉiela por eksorĉi mondon per sia voĉo, kaj se mi povas al vi paroli, kiel al mortulo, — prenu min, kiel edzinon kaj iru kun mi en domon de mia patrino, porke ŝi ekvidu, kian edzon mi ekelektis..

Ek rediris:

„Belega vi estas, kiel diino, sed mi ne povas kun vi foriri. Mi dediĉis min al dia scienco kaj rifuzigis teraĵojn“.

„Permesu do al mi, veni tien ĉi ĉiutage kaj aŭskulti vian voĉon, — diris Theau kaj foriris malĝoja.

Ek restis sola, sed ia stranga maltrankvileco ekregis lian animon, maltrankvileco,

<sup>1)</sup> hinda monaĥejo.



celadoj la „Kaufmännischer Verein“ kun 17000 membroj. La celo de „Progreso“ estas propagandi Esperanton inter la komercistoj, kiuj ja plej ofte havas rilatojn kun alilingvanoj kaj tial unue ekkonos la la gravecon de nia ideo.

La Elbinga grupo eldonis esperantajn bierteleretojn. La prezo de tiuĉi propagandilo estas 3 M po 100 pecojn.

**Gvatemalo.** Junaj esperantistoj fondis grupon en Antiqua Guatemala sub nomo „Geinfana Zamenhofa Grupo“.

**Hindujo.** En Marikuppan kaj Jetpur fondiĝis esper. grupoj. Ankaŭ en la insulo Cejlon disvastiĝas Esperanto.

**Hispanujo.** La Madrita ĵurnalo „El Electricista“ presadas kurson de lingvo Esperanto. Fondiĝis „Katalunja societo esperantista“ en Barcelono kaj grupoj en Burgas, Guardia, Torquemada, Bilbao, Foz (Lugo) kaj Korunjo.

**Holando.** La Haga grupo gajnis 30 novajn membrojn. Sro Uitterdijk legas kurson en Amsterdamo.

**Hungarujo.** Post longedaŭra laboro kaj batalado kun grandaj malhelpaĵoj fondiĝis „Hungara Societo Esperantista“, kies organo ostas (hungara) „Esperanto“ ilustrata ĵurnalo. La Debrecena grupo, konsistanta precipe el studentaro kreskas malrapide sed certe. La grupo en Szeged prilaboras lernolibron de esperanta stenografio laŭ sistemo Gabelsberger. Dank'al subtenado de hun-

gara gazetaro nia ideo faras grandajn progresojn.

**Italujo.** Ministraĵo de Popola Klerigado enprenis sian patronecon Sicilian Esperantistan Societon. Sro Frassi, rektoro de universitato en Parma enkondukas tie Esperanton.

En Palermo fondiĝis societo „La Fasko, humana kunfratigo internacia“. Ĝia organo estas nova gazeto „Idealo“, kiu samtempe estas organo de la Sicilia Federatio Esperantista kaj de l' Federatio Esperantista „Malta Stelo“.

**Islando.** Fiskaptaj ŝipoj apartenantaj al Sro Duchochois en Bulonjo-sur-Mar, portantaj la verdajn esperantistajn flagojn alvenis Rejkjavik'on kaj la ŝipanaro, dank'al senzacio kaŭzita de ilia ilago, trovis tie esperantistojn por interparolado.

**Japonujo.** Japona lernolibro de Esperanto estis nun jam eldonita. Dua kurso komenciĝis en Okajama kun 546 gelernantoj, el kiuj la plimulto estis Japonoj. Nia lingvo disvastiĝas tie precipe inter studentaro kaj en socialistaj rondoj.

**Malto.** La tiea grupo farigis „Societo por propagando de Esperanto“. En La Vallette oni legas du kursojn por viroj (30 aŭskultantoj) kaj virinoj (70 aŭskultantinoj).

**Nova Zelando.** En la tutmonda ekspozicio en Christchurch dum la jaro 1907 estos aranĝita aparta esperantista sekcio. La tiea Societo havas pli ol 100 membrojn.

kiun li ne ĝuadis dum enfundiĝado en plej belajn pensojn de l' saĝulo. — Ĉiutage li vidadis Theaŭ'on — ĉiutage li revenadis en larmoj monaĥejon. Konsilon li serĉadis en profundaj teorioj de filozofoj, en fajroplenaj kantoj verkitaj de malnovaj poetoj — Kari, en honoron de Granda Triunuo hinda kaj en honoron de granda Parrati, edzino de Viŝnu kaj Nigra Kali, edzino de severa Ŝiva... Kaj tamen vortojn de l' kanto senordigadis en li unu konata melodio: Vi indas, li direktis — knabino plej altan el reĝaj tronoj... Vi devas vin levi al eterna suno, kie estras Indra, vi devas naĝadi per stelaj boatoj sur dorma bluaĵo de l' nokta ĉielo. Ho, Theaŭ, en malproksimeco de vi, mi konsumigas pro sopiro je vi — mia kanto ne havas forton kaj mi mem estas senforta, kiel infano.

Maljuna bonza-lernisto ekaŭdis ĝemojn de l' lernanto, divenis kaŭzon de malĝojo kaj diris severe:

•Frenezulo! Grandajn esperojn mi me-

tas en vi, — kaj vi tamen ne povas rifuzi tentojn de Sansara kaj celi la kunigon kun saĝulo en nekonata neesto. Iru do, sed sciu, ke vi inter vantecoj de videbla mondo ne trovos feliĉon, kion vi deziras — nur mal sukcesojn kaj malĝojojn! Iru!..

...Ek iris ĝojege kun sia amata Theaŭ... Ili trakis multajn urbojn — multajn landojn. Juna kantisto serĉadis mondon per sia kanto. Lia famo kreskadis pli kaj pli... kaj jen potenca reĝo venigis lin al si, kiel unuan en lando poeton, donis al li belegan palacon, ĉirkaŭis per komforto, postulante reciproke nur — ĉarmajn kantojn de Kari.

Theaŭ ĝuis saman sukceson. Oni admiris ŝin, adoris, enviis al ŝia edzo. Vivo de poeto fluadis kviete kaj trankvile.

Sed filo de unua reĝa indulo, Arhum, ekvidinte junam virinon, ekflamigis amege kaj decidis reponi ŝin de poeto.

daŭrigota

esp. St. Lazica.



*Peruo.* Esperantita grupo fondiĝis en Lima.

*Russujo.* Diversaj, al ĉiuj niaj legantoj konataj, kaŭzoj fariĝas nun malfacile ricevi certajn sciigojn pri stato de nia ideo en tiu malfeliĉa lando. La oficiala organo de societo „Espero“ la „Ruslanda Esperantisto“ tial ankaŭ iom malfruigis. El ĝi ni ĉerpas sekvantajn notojn: „Konata opera kantistino, S-ino Tamara, kantis en Moskvo esperante kaj oni atendas ŝin tre senpacience en eksterlando, kie ŝi jam estas nomata „unua esperanta najtingalo“. Ageme klopodas pri eldono, je propraj monrimedoj, de esperantaj lernolibroj por nacioj tiajn ankoraŭ ne posedantaj — nun eksterlande vojaĝanta rusa inĝeniero N. P. Evstifeief“.

Rim. Sro Evstifeief, al kiu ankaŭ nia leopola societo ŝuldas grandan dankemecon, estis dum pasinta printempo nia gasto kaj tial al multaj niaj societanoj persone konata.

*Svedujo.* Simile kiel en kelkaj aliaj landoj, ankaŭ la Svedaj esperantistaj grupoj

unuigis Esperantistan Ligon. Sro Dro Etzel instruas lingvon Esperanton en Stokholmo al militistaro de Reĝa Ĉevala Gvardia. Pri disvastigo de Esperanto inter la Bontemplanoj ni aliloke presas leteron ricevitan de unu el ili.

*Svisujo.* Esper. Societo en Winterthur formigis apartan komitaton, kiu devas akceptadi fremdajn geesperantistojn, vizitantajn jenan urbon. La esper. grupo en Ĝenevo eldonis bonegan tradukon de Siller' Vilhelmo Tell“ verse verkita de L. Meier.

Stenografia esperanta ĵurnalo „Flugila stelo“ pligrandigis sian amplekson kaj malfermante kvaran internacian konkurson oferas kiel premio la supre nomitan verkon.

*Transvalo.* Esperantista grupo formigis en Pretoria.

*Usono.* Dank'al energia subteno de multaj gazetoj nia afero ĉi tie tre sukcesas. Grupoj fondiĝis en 18 urboj. La aŭskultantaro de superaj lernejoj kaj la maristaro pleje ekinteresiĝis je nia lingvo.

## Dua ĝenerala esperantista kongreso en Ĝenevo.

Se jam unua esperantista kongreso en Bulonjo-sur-maro, malgraŭ nekalkuleblaj malfacilaĵoj, malgraŭ ia malkonfido flanke de ĵurnalistaro, sciencaj institucioj kaj multegaj diversaj skeptikuloj, plene sukcesis kaj rimarkinde prosperis elmontri kaj pruvi al la mondo, ke Esperanto tute taŭgas por ĉiaspeca, ĉiutaga uzado kaj por ĉiuj branĉoj de gravaj sciencoj, tute taŭgas esti lingvo internacia, tutmonda — la dua kongreso ĉiujara pruvis la samon ankoraŭ pli bone, pli altgrade. Sendube la dua kongreso okazis en nekompareble pli bonaj cirkonstancoj. Multaj homoj ĉesis rigardi Esperanton kiel „neefektivigeblan elpensacon“, kiel „sensignifan, senvaloran infanaĵon“. Esplorinte la aferon, homoj iom post iom konvinkigis, ke Esperanto estas plej valora, plej eminenta el ĉiuj eltrovaĵoj kaj ĝia kreinto estas bonfaranto de homaro.

Elektito de bela Ĝenevo kiel kongresejo estis tre feliĉa. Antaŭ ĉio gastema patrujo de Tell jam pro siaj naturaj ecoj tre taŭgas por kongresoj; krom tio ĝiaj vidindaĵoj allogas multajn turistojn kaj homojn, kiuj volas ripozi en ĉarma montaro post tutjara laboro kaj fine en Ĝenevo okazas tiom da diversaj kongresoj, ke ĝi jam ha-

vas grandan sperton, por arangi ilin festaj, sukcesaj kaj interesigaj.

Tiel ankaŭ nune ĝi faris ĉion, por inde honori la kreinton de Esperanto Sron Zamenhofon kaj kongresanojn, venintajn el plej diversaj anguloj de l'mondo.

Ĉion trovis la kunvenintoj preta; pri ĉio klopodis loka komitato — pri oportunaĵoj, logejoj, pri bonaj restoracioj, pri gvidistoj, dum ekskursoj, pri diversaj amuzoj — unuvorte pri ĉio.

Dum kelkaj tagoj antaŭ kongreso elrigardis oficejo de loka komitato kvazaŭ abelujo. Ses oficistoj estis seninterrompe okupataj. Jen petas iu strange vestita fremdlandulo kongresan karton, jen alia deziras diversajn klarigojn, jen alvenas leteroj kaj telegramoj el Ĉeĵlono, Vladivostoko, Tuniso, Stokholmo, Tokio, el ĉiuj partoj de l'mondo, jen fine oni alportas sendaĵojn por samtempe aranĝita, esperanta ekspozicio.

En tago de kongreso t. e. 28an de aŭgusto jam de frua mateno laboras multaj sekcioj kaj komitatoj. Urbo ornamigas feste. Sur stacidomo, sur publikaj kaj ankaŭ multaj privataj domoj ŝanceligas diverskoloraj standardoj. Strataj muroj ornamitaj per verdaĵo kaj floraro. Sur stratoj, en restora-



cioj, en kafejoj, ĉie brilas »verda steleto«. Stacidomo plenigita de esperantistoj kaj ne-  
esperantistoj atendantaj senpacience alvenon  
de vagonaro kun prezidanto de kongreso,  
Dro Zamenhof. Fine alvenas vagonaro; el  
paŝas genia kreinto de Esperanto en socie-  
to de eminentaj esperantistoj. Je lia ekvido  
elsiriĝas el miloj da brustoj de l'samideanoj  
unu granda saluta ekkrio: Vivu, nia kara  
Majstro, vivu Zamenhof, vivu Esperanto!  
kaj la vento ekkaptas tiun ĉi ekkriion kaj je  
ordono de Anĝelo de praco, forportas ĝin  
pluen — kaj pluen — ĝis lastaj randoj de  
l'mondo, al ĉiuj, al kiuj kara estas la ideo  
kaŭzonta interproksimiĝon de homoj, kaŭ-  
zonta popolan fratecon. Ĉi tiu nekalkulebla  
sekvantaro akompanas Zamenhofon en  
urbon.

Antaŭ tagmezo neoficiala kunsido; Ape-  
ras Zamenhof; entuziasmo nepriskribebla —  
ekkrioj kaj aplaŭdado ne finiĝas. Post ioma  
trankviliĝo ekstarigas generalo Gebart, mem-  
bro de l' franca, scienca akademio kaj le-  
gas kongresan regularon, laŭ kiu estas mal-  
permesite dum kongresaj paroladoj tuŝi ion  
koncernantan politikon, religion, naciecon,  
entute ĉion, kio povus iun ofendi kaj de-  
trui kongresan harmonion. Poste sekvas re-  
citado de senditaj multenombraj telegramoj  
de diversaj universitatoj, sciencaj institucioj  
kaj multaj precipaj tiel esperantistoj kiel  
ankaŭ neesperantistoj.

Konstituigo de kongresa komitato fin-  
plenigis restan matenan kunsidon. Oficiala  
malfermo de kongreso estas okazota vespe-  
re en grandega lokalo »Viktoria Halo«.

da ŝirigota.

## KRONIKO.

### Galicya.

Ruch esperantystyczny obejmuje coraz  
szersze koła; zainteresowanie się — chociaż  
powoli jednak z każdym dniem wzrasta.  
Większe miasta zwracają się po informację  
o tej dotąd nie wiele znanej sprawie. Dzien-  
niki, które początkowo bardzo niedowierza-  
jąco spoglądały na pierwszych propagato-  
rów, obecnie chętnie zamieszczają artykuły  
o Esperancie. Tak »Słowo polskie«, główna  
gazeta w naszym kraju zamieściła piękny  
artykuł o języku międzynarodowym w ogól-  
ności i o dotychczasowych próbach na tem  
polu. Po genewskim kongresie ukazały się  
w wspomnianej gazecie i w »Czasie« długie  
artykuły o Esperancie i o samym kongresie.  
Tak samo znajdujemy w »Kraju« i »Nowo-  
ściach ilustrowanych« artykuły o tym języku  
wraz z fotografiami lwowskich i kraków-  
skich propagatorów. Również na prowincyi  
nie pozostają gazety w tyle, ale podają od  
czasu do czasu wiadomości o ważniejszych  
postępach Esperanta. Spodziewamy się, iż  
wkrótce będziemy mogli zarejestrować kilka  
nowych grup esp.

Lwów. Po pierwszym publicznem kur-  
sie, pod kierownictwem p. St. Łazicy —  
na który bardzo licznie uczęszczano, nastąpił  
nieznaczny zastój z powodu braku własnego  
lokalu i nadejścia wakacyi, albowiem wiele

### Galicio.

Esperantista movado ĉirkaŭas pli kaj  
pli vastajn rondojn; ekinteresiĝo, kvankam  
ne rapide tamen ĉiutage kreskiĝas. Pli gran-  
daj urboj informas sin pri tiu ĝis nun malmulte  
konata afero. La ĵurnaloj, kiuj komence tre  
malŝate rigardis unuajn batalantojn, nune vo-  
lonte enmetas artikolojn pri Esperanto. Tiel  
»Słowo polskie«, ĉefa gazeto en nia lando  
enmetis belan artikolon pri lingvo inter-  
nacia entute, kaj pri ĝisnunaj provoj sur  
tiu ĉi kampo; Post la ĝeneva kongreso ape-  
ris en citita gazeto kaj en »Czas« longaj  
artikoloj pri Esperanto kaj pri kongreso  
mem. Same ni trovas en »Kraj« kaj en »No-  
wości ilustrowane« (Ilustritaj novaĵoj) arti-  
kolojn pri tiu ĉi lingvo kun fotografioj de  
leopolaj kaj krakoviaj propagandistoj. Ankaŭ  
provinca gazetaro ne restas malantaŭe, sed  
sciigas de tempo al tempo pri pli gravaj  
progresoj de Esperanto. Ni esperas, ke bal-  
daŭ ni povos enregistri kelkajn novajn gru-  
pojn esp.

Lvovo. Post la unua publika kurso,  
direktata de Sro St. Łazica kaj mul-  
tenombre vizitata, venis iometa staro pro  
manko de propra kunvenejo kaj pro sekvi-  
taj libertempoj, ĉar multaj personoj forve-  
turis. Sola ligilo inter la restuloj estis la  
dimanĉaj akkursoj en leopolan ĉirkaŭaĵon,



osób wyjechało. Jedynym łącznikiem pomiędzy pozostałymi, były niedzielne wycieczki w okolice Lwowa, podczas których wspólnie czytano i rozmawiano po największej części tylko po esperancku. Od września posiadało towarzystwo już własny lokal, gdzie co wieczór zbierają się lwowscy esperantysty. Drugi kurs rozpocznie się z początkiem października. Z zainteresowania się Esperantem we wszystkich sferach i klasach można wnosić na liczne uczęszczanie. Towarzystwo, podczas swojego krótkiego istnienia wydało podręcznik esperancki, obszerny słownik w dwóch częściach i broszurę Dra Couturat w tłumaczeniu Dra Dybowskiego, profesora uniwersytetu lwowskiego; postanowiło również wydawać dwumiesięcznik »Pola Esperantisto«, mający zawierać obszerną kronikę z Galicyi, ruch i postępy Esperanta na całym świecie i literacką część, tak tłumaczenia jak i oryginalne utwory w Esperancie.

P. J. Barvič, członek wydziału praskiego klubu esperantystów, odbywający ćwiczenie wojskowe w Przemyślu odwiedził lwowskie towarzystwo i od tego czasu zawiązano serdeczne stosunki pomiędzy dwoma bratnimi narodami.

**Kraków.** Wydział krakowskiego Towarzystwa; Dr. Schudmak, prezes, radca Dębicki, wiceprezes, T. Biliński, sekretarz, inż. E. Kostecki, skarbnik i M. Jarocki, bibliotekarz. Chociaż towarzystwo zawiązało się w niedogodnym czasie — albowiem przed samymi wakacjami, jednak, dzięki niestrudzonemu wydziałowi, ilość zwolenników coraz bardziej wzrasta; ładny lokal i zaopatrzona według sił biblioteczka zgromadza często gorąco oddanych idei członków. W pierwszych dniach października otwiera towarzystwo kurs, poprzedzony odpowiednim odczytem. Osobny kurs esp. ma być urządzony w lokalu młodzieży handlowej. Artystyczne, ilustrowane widokówki, wydane nakładem towarzystwa oddadą wielką usługę w propagowaniu naszej idei. P. Goldman wydał podręcznik esp. według naturalnej metody.

**Tarnopol.** Dzięki niestrudzonym esperantystom (pp. Jurków i Łopatyński) Esperanto zapuściło silnie korzenie w tem postępowem mieście; po odczycie p. Łazicy i po przychylnych artykułach w tarnopolskich dziennikach ruch ten jeszcze wzrósł. Dr. Wang, prezes tarnopolskiej Czytelni naukowej, zwolennik naszej sprawy odstąpił bezpłatnie lokal tak na odczyt, jak i na mające się odbywać kursa. Również miejscowi

dum kiuj oni kune legadis kaj paroladis plejparte nur esperante. De aŭgusto havas jam la societo propran lokalon, kie ĉiujesperere kunvenas lvova esperantistaro.

La dua kurso kamenciĝos ĉirkaŭ 1 de Oktobro en Supera reala lernejo. Je la ekinteresigo pri Esperanto en ĉiuj sferoj kaj klasoj, oni povas supozi, multenombrian vizitadon. La societo eldonis dum sia mallonga ekzistado esperantan lernolibron, vastan vortaron en du partoj kaj broŝuron de Dro Couturat, tradukitan de lvova, universitata profesoro Dro Dybowski; decidis ankaŭ eldonadi dumonatan organon »Pola Esperantisto«, enhavonta, vastan kronikon de Galicio, tutmondan movadon kaj progresadon de Esperanto kaj literaturajojn, tiel tradukitajn kiel ankaŭ originale verkitaĵojn en Esperanto.

Sro J. Barvič estrarano d l' Praha esperantista Klubo dum sia militservo en Przemyśl vizitis leopolajn Samideanojn kaj de tiu ĉi tempo, estas ligitaj varmaj rilatoj inter du frataj nacioj.

**Krakovio.** Estraro de Krakovia societo: Dro Schudmak, prezidanto, konsilano Dębicki, vicprezidanto, Tad. Biliński, sekretario, inĝ. Ed. Kostecki, kasisto kaj Mar. Jarocki, bibliotekisto. Kvankam la societo fondiĝis en negusta tempo, ĉar ĵus antaŭ libertempo, tamen dank' al nelaca estraro, anaro grandiĝas pli kaj pli; beleta lokalo kaj laŭpove provizita librareto kunvenigas ofte fervorajn societanojn.

En unuaj tagoj de oktobro oni malfermas kurson antaŭitan de konvena parolado. Artaj, ilustritaj poŝtkartoj, eldonitaj de l' societo estas bonega propagandilo de nia ideo. (Aparta kurso esp. estas aranĝota en lokalo de »Komerca, junulara societo«. Sro Goldman eldonis lernilon laŭ natura metodo).

**Tarnopolo.** Dank' al nelacemaj esperantistoj Sroj Jurków kaj Łopatyński enradiĝis Esperanto forte en ĉi tiu progresema urbo. Post farita parolado de Sro Łazica kaj post belaj artikoloj en tarnopolaj ĵurnaloj la movado iom plifortiĝis. Sro Dro Wang, prezidanto de l' tarnopola »Czytelnia naukowa« (Scienca legejo), kiu tre favoras nian aferon, permesis senpage lokalon por publika parolado kaj por malfermota esperanta kurso. Ankaŭ lokaj laboristoj montras ekinteresigon pri Esperanto. Sro Jurków penadas eldonon de rutena lerno-



robotnicy okazują zainteresowanie się Esperantem. P. Jurków pracuje obecnie nad wydaniem ruskiego podręcznika. Jak się właśnie dowiadujemy — zawiązuje się już w najbliższych dniach towarzystwo esp.

**Przemyśl.** 16 września wygłosił w Przemyślu bardzo udały odczyt przed licznie zgromadzonem audytoryum p. T. Biliński, sekretarz krakowskiego towarz. esp. w ratuszu; Obecni byli również delegaci lwowskiego towarz. Mowca skreśliwszy w żywych słowach drugi ogólny kongres w Genewie streścił historię prób i prac na polu wprowadzeniu międzynarodowego języka aż do dzisiejszych czasów, następnie przedstawił obecny stan ruchu esp. i wreszcie wyłożył w krótkich zarysach zasady esp. gramatyki. Odczyt bardzo zainteresował obecnych. Potrzebnych broszur i podręczników dostarczyli lwowscy delegaci. Ponieważ kierownictwo wziął w swe ręce ruchliwy zarząd miejscowy ludowego uniwersytetu, można się więc spodziewać, iż sprawa pójdzie dobrą drogą.

**Nowy Sącz.** W tem pięknem podgórskim mieście zawiązało się towarzystwo esp. i, jak się dowiadujemy, dobrze prosperuje; niestety nie mamy jednak bliższych wiadomości.

**Brody.** Odczyt p. St. Łazicy bardzo zainteresował licznie zebranych słuchaczy. W ogóle nadgraniczne to miasto handlowe jest postępem i pozwala nam spodziewać się, iż jego ludność tak narodowo różna przyjaźnie przyjmie naszą ideę.

**Sanok.** W mieście tem istnieje klub już od kilku lat; byłoto pierwsze towarzystwo esp. w Galicyi; składało się początkowo z kilku tylko osób, którzy postanowili przede wszystkim sami dobrze się nauczyć języka tego, a potem go dopiero rozszerzać. Obecnie rozwija się klub coraz lepiej i zyskuje z każdym dniem nowych członków. Klub Sanocki niezwykle daje dowód, co można osiągnąć pracą ciągłą i wytrwałą.

**Bełz.** Według otrzymanego właśnie uwiadomienia, zawiązało się w Bełzcu kółko esperantystów dzięki inicjatywie p. M. Potockiego i A. Grenika. Prezes: p. W. Gwozdowicz, sekretarz: M. Potocki.

libro. Kiel ni ĵus sciiĝas, fondiĝas tie ĉi en proksimaj tagoj societo esp.

**Przemyśl.** 16an de septembro faris en Przemyśl tre sukcesan paroladon antaŭ multenombra aŭdantaro S-ro T. Biliński, sekretario de l' krakovia esp. Societo en urbdomo; ĉeestis ankaŭ delegitoj de Lvova societo. Parolanto ekpentrinte en vivaj vortoj duan ĝeneralan kongreson en Genevo, desegnigis historion de ĝisnunaj provoj kaj laboroj sur kampo de internacia helpa lingvo, sciiĝis sekve pri nuna stato de esp. movado kaj fine komprenigis en kelkaj vortoj principojn de esp. gramatiko. Parolado tre ekinteresis apudestantojn. Necesajn broŝurojn kaj lernolibrojn liveris Lvovaj delegitoj. Ĉar tutan direktadon prenis en manojn agema estraro de loka popola universitato, oni povas do esperi, ke la afero iros bonan vojon.

**Nov-Sącz.** En tiu ĉi bela, submonta urbo fondiĝis grupo esp. kaj, kiel ni sciiĝas, prosperas bone: »bedaŭrinde tamen — ni ne havas ĝis nun detalajn sciiĝojn.

**Brody.** Parolado farita de S-ro St. Łazica tre ekinteresis multenombrajn kunvenintojn. Entute ĉi tiu apudlima komerca urbo estas progresema, kaj permesas nin esperi, ke ĝia diversnacia loĝantaro amike akceptos nian ideon.

**Sanok.** En ĉi tiu urbo ekzistas klubo esperantista jam de kelkaj jaroj; ĝi estis unua societo esp. en Galicio, kaj konsistis komence el kelkaj nur personoj, kiuj antaŭ ĉio decidis mem bone ellerni la lingvon kaj poste disvastigadi ĝin. Nune prosperas la klubo pli kaj pli kaj ĉiutage sin aligas novaj anoj. Le sanoka klubo plej rimarkinde pravas, kion oni povas per konstanta kaj obstina laborado atingi.

**Bełz.** Laŭ ĵus ricevita sciiĝo fondiĝis en Bełz esperantista rondeto dank' al iniciato de S-roj M. Potocki kaj A. Grenik. Prezidanto: S-ro W. Gwozdowicz, sekretario: M. Potocki.



## Bohemujo.

**Esperantista klubo en Praha** — fondita en j. 1902 — senlacigite penas pri plej multa disvastiĝo de esperanto en Bohemujo. Nuntempe havas jam Unuan virinan grupon en Naprstkovo museum, grupo en Plzen, Prosek kaj Česká Budejovice, kaj oni nun ankoraŭ pripensas, kiamaniere estus eble nek nur novajn grupojn fondi, sed ankaŭ precipe enkonduki esperanton en publikajn lernejojn. Klubo povas jam kontente rerigardi en pasintajn jarojn plenajn de oferema klopodo kaj sincera peno ĉar multaj malhelpaĵoj falis kaj longedatiranta laboro gajnas al ideo pli kaj pli da samideanoj. Oni paŝas malrapide, sed antaŭen, kaj tio incitas ĉiujn klubanojn al novaj bataloj kun refreŝigaj fortoj. Biblioteko kalkulas nun pli ol 200 da diversaj libroj el esp. literaturo ĉiulanda kaj konstante kreskas per novaj verkoj el la literaturo. Krom tio abonas klubo ankaŭ 23 gazetojn kiuj atestas, ke inter bohemiaj esperantistoj ekzistas vera intereso pri esperanto kaj ĝia sukcese progresanta propagando.

Por ke ankaŭ tiuj anoj klubaj, kiuj ne loĝas en Praha kaj kiuj ne estas tiel feliĉaj loĝi en loko de ia grupo, portoprenu kaj uzadu sukceson de esperanto, decidis kluba komitato, ke al tiuj eksterloĝantaj membroj estu alsendataj gazetoj de klubo abonataj. „Rondiranta legejo“ oni nomos ĉi tiun entreprenon. Ĉiu eksterloĝanta ano sciigas al klubo sian volon partopreni je legejo. Estraro aranĝis rondetojn de petintaj anoj, al kies ĉiuj anoj estas sinsekve sendata po unu ekzemplero de diversaj

gazeton post unu semajno al dua, tiu al tria, k. t. p., ĝis al la lasta; tiu ĉiam resendas gazeton al klubo.

La unua ree forsendinte gazeton al dua, ricevas novan de klubo.

Entrepreno tiu estas tre bona, ĉar grandan profiton havas el aliĝo al klubo ankaŭ ekster Praha loĝantaj membroj, kaj krom tio estos ankaŭ multaj novaj anoj gajnitaj. Ĉi tiu ideo devenas de nia multemerita prezidanto S-jo Vojtěch Kraus, kiu ankaŭ nun zorgas pri dissendado de gazetoj.

Ne malpli grava estas por propagandi esperanton publikado de esperantaj novaĵoj en gazetoj, el kiuj precipe „Obchodní listy“ („Komercaj folioj“) enhavas en ĉiu numero rubrikon raportantan pri sciigoj gravaj kaj interesaj ĉefe por komercistoj. Rubrikoj estas bohemiaj kaj esperantaj, redaktataj de S-o E. Kůlnl.

Krom tiuj bohemiaj kluboj kaj grupoj ekzistas ankoraŭ memstara klubo esperantista germana en Reichenberg kaj Leitmeritz.

El Moravio oni povas raporti ĝojantan sukceson, ke en Prostejov la venontan jaron prof. Friedrich instruos esperanton en la reala lernejo. Unua publika lernejo — bohema — en Aŭstrio komencas propagandi ideon de feliĉa homaro. Unua paŝo en baldaŭan pli feliĉan estontecon, ĉar post unua paŝo baldaŭ sekvas dua. — Nur bonajn, sincerajn kaj ofereblajn propagandantojn. Kia lernejo estos dua?

J. B.

## Esperanto a Volapük.

I z tego jeszcze powodu deklinacya Volapüku niema cechy międzynarodowości, ponieważ większa część obecnych języków a między nimi najwięcej rozpowszechnione, posiada rzeczowniki nie zmieniające się, a tylko zmieniające się przedimki i przyimki np. ang.: the room (pokój), of the room (pokoju i t. d., franc.: la mère (matka), de la mère (matki) à la mère (matce); niem.: die Biene (pszczoła), der Biene (pszczoły 2. przyp.) i podobnie we wszystkich prawie nowych językach, oprócz słowiańskich, które zresztą przedimka nie znają. — Deklinacya więc w esperancie jest więcej

## „Esperanto“ kaj „Volapik“.

La volapika deklinacio estas krom tio neinternacia, ĉar la plimulto de nuntempaj lingvoj kaj inter ili la ĉefaj lasas la substantivojn neŝanĝitajn aldonante nur ŝanĝeblan artikolon aŭ prepozicion, ekz. angle: the room (la ĉambro), of the room (de la ĉambro), to the room (al la ĉambro); france: la mère (la patrino), de la mère (de la patrino), à la mère (al la patrino); germane: die Biene (la abelo), der Biene (de l'abelo); kaj simile en preskaŭ ĉiuj novaj lingvoj krom la slavaj, kiuj cetere ne havas artikolon. La esperanta deklinacio estas do pli internacia, pli komprenebla por la ĉefaj na-



międzynarodową, zrozumiałą dla większych narodów a przybranie niezupełniej samogłoski »j« dla oznaczania liczby mnogiej jest bardzo szczęściwem, ponieważ prawie nie zmienia brzmienia końcówek, nie przesuwając akcentu i może tak samo być użytą tak dobrze dla rzeczowników, przymiotników, zaimków dzierżawczych, liczebników porządkowych, imiesłówów i znajduje analogię w języku greckim (λόγοι, δικαιοι δέντεροι, γρηγομέραι) i in.

Przymiotniki w »Volapüku« kończą się na »ik« albo »lik« niema jednak dokładnych reguł kiedy się końcówek tych ma używać i jaka jest pomiędzy nimi różnica. Np. jun (według Volapüku yun) znaczy młodość i młodzież, junik młody, julik młodzieńczy. Nie można więc samemu tworzyć przymiotników tylko je trzeba »wykuć« na pamięć. Wogóle prawie wszystkie reguły volapüku są niedokładne. Inny przykład: końcówka »ön« służy do utworzenia czasowników z rzeczowników n. p. pot, poczta, potön — wysłać pocztą; jim, nożyce, jimön — strzec.

Teraz porównajmy najważniejszą część gramatyki, t. j. konjugację słowa. W Esperancie ona prawie nie istnieje, ponieważ my dodajemy całkiem pojedynczo rozmaite zaimki dla oznaczenia osoby i liczby, a końcówki zmieniają się tylko przy oznaczaniu czasów i trybów. W ten sposób konjugacja, ta prawdziwa męczarnia dla uczących się obcych języków staje się bardzo łatwą, a mimo to dosyć bogatą. Gramatyka »Volapüku« jest o wiele bogatszą (505.440 form), ale jest zato niezwykle skomplikowaną, gdyż odrzuciwszy słówko posiłkowe »być«, musi używać rozmaitych przyczepek i wstawek. Volapükisci ze słowem łączą zaimek np. lö fob (kocham) a następnie dodają sufiks, oznaczający tryb: löfoböv (kochałbym). Czasy i formy oznacza się zapomocą rozmaitych liter: o löfob (będę kochał), polöfob (będę kochany). Esperankie: »mi estos amata« zrozumie zapomocą słownika i nieesperantysta, lecz słówka »polöfob« nikt nie znajdzie w słowniku bez dokładnej znajomości gramatyki, gdyż nikt nie zgadnie, że słowo rdzenne jest »föb«. Zauważyłam przytem, iż słówko to nie jest jeszcze zanadto skomplikowane; w Volapüku bowiem znajdują się formy słowa, których nawet tegi volapükista nie mógłby zrozumieć, a nawet kilka razy wyznaczano nagrody dla tych, którzyby odgadli znaczenie volapüekich słów typowych np. lopikalarovidasekretel (1).

W końcu dodaję, iż w »Vlapüku« akcen-

cioj kaj la elekto de duonvokalo „j“ kiel signo de multenombro estas tre felica, ĉar ĝi preskaŭ ne ŝanĝas ba sonon de vortfiniĝoj, ne alilokigas la akcenton kaj povas esti same bone uzata por substantivoj, adjektivoj, posedaj pronomoj, ordigaj nombroj, participoj kaj havas analogion en lingvo greka: (λόγοι, δικαιοι, δέντεροι, γρηγομέραι); k. a.

La adjektivoj finiĝas laŭ volapika gramatiko per »ik« aŭ »lik«, sed oni ne donas precizajn regulojn pri uzado de tiuj ĉi du finiĝoj kaj pri ilia diferenco. Ekzemplo: jun (laŭ volapika alfabeto yun) signifas juneco kaj(!) gejunularo, junik signifas juna, junlik sign. junula. Tial oni ne povas mem formi adjektivojn kaj devas ilin ĉiujn ellerni. Entute preskaŭ ĉiuj volapikaj reguloj estas tro neprecizaj, ni citu: La finiĝo »ön« servas por konstrui verbojn el substantivoj, ekz. pot (poŝto), potön (sendi(!) per poŝto) aŭ »jim« (tondilo) jimön (tondi!)

Nun ni komparos ia plej gravan parton de ĉia gramatiko, nome la konjugacion de verboj. En Esperanto ĝi preskaŭ ne ekzistas, ĉar ni simple aldonas la pronomojn por montri personon aŭ nombbron kaj ŝanĝas vortfiniĝojn por montri tempojn aŭ modojn. Tiamaniere la konjugacio, la plej granda turmentado de ĉiuj lernantoj fremdajn lingvojn fariĝas mirinde facila kaj tamen sufiĉe riĉa. La volapika konjugacio estis pli riĉa (ĝi havis 505.440 formojn!), sed tial multfoje pli komplikita, ĉar rifuzinte uzadon de helpa vorto »esti«, ĝi nepre estis devigita enkonduki multajn afiksojn. La volapikistoj aldonas al verbo la pronomon: löfob (mi amas), poste la sufikson de modo: löfoböv (mi amus). La tempoj kaj formoj estas signitaj per literoj: o löfob (mi amos) polöfob (mi estos amata). La vortojn »mi estos amata« komprenos kun helpo de vortaro ĉu neesperantisto, sed la vorton »polöfob« sen detala ekkono de gramatiko neniu trovos en vortaro, ĉar oni ne povas diveni, ke ĝi komencas per »löf«. Kaj mi rimarkas, ke tiu ĉi ekzemplo estas ankoraŭ ne tro komplikita; oni en volapik' povas trovi konjugaciajn formojn, kiujn tre lerta volapikisto ne komprenus kaj kelkfoje estis oferitaj premioj al divenintoj de tiaj volapikoj ekr. »lopi-kalarovidasekretel«.

Fine mi memorigas, ke en volapik' la lasta silabo de ĉuj vortoj estas akcentata kaj oni devas ĝin longe elparoladi. Volu do leganto, mem kompari la belsonecon de skvantaj frazoj.



tuje się ostatnią zgłoskę i wymawia się ją długo. — Zechciej więc sam czytelniku porównać następujące frazesy: (volapük) Balsetelul binom begin nifatima, kikul flolatima. Söl at elifom yelis ans in Lusän e Flent, pükom lusäniko e flentiko.

(Esperanto, akcent na drugiej od końca). Decembro estas komenco de la vintro, marto de la printempo. Tiu ĉi sinjoro vivis kelkajn jarojn en Rusujo kaj Francujo li parolas ruse kaj france.

Teraz przejdźmy do słownika.

Nie można znaleźć lepszej metody do przekonywania przy werbowaniu nowych zwolenników Esperanta, jak dać im samym do osądzenia różnicę, jaka pomiędzy słówkami jednego i drugiego języka zachodzi. Zechciej więc czytelniku przeczytać poniżej podane słówka volapückie a potem te same po esperancku. Jestem pewny, iż każdy średnio wykształcony człowiek z pierwszych nie bardzo wiele zrozumie, podczas gdy drugie prawie wszystkie zrozumie.

1. Balsul, 2. begön, 3. bel, 4. benovip, 5. blod, 6. cem, 7. depad, 8. dentiko, 9. dokel, 10. döł, 11. hol, 12. kil, 13. jireg, 14. lekanel, 15. leüt, 16. lol, 17. Löstakin, 18. planov, 19. tenüp, 20. vadat, 21. zied, 22. ziegad, etc. — (Esperanto:): 1. Oktobro, 2. peti (peticio słowo międzynarodowe), 3. monto, 4. gratulacio, 5. frato, 6. ĉambro, 7. depeŝo, 8. germane, 9. doktoro, 10. ideo, 11. horo, 12. tri, 13. reĝino, 14. artisto, 15. oleo, 16. rozo, 17. Austrujo, 18. botaniko, 19. eterneco, 20. kvadrato, 21. citriono, 22. cigaro etc.

Dlaczego więc jeden autor użył na oznaczenie tych samych przedmiotów tak różnych nazw, tak niepodobnych do nazw użytych przez drugiego autora, i dlaczego jedne nazwy są całkiem zrozumiałe, podczas gdy drugie jeśli nie całkiem, to przynajmniej w małej części zrozumiałe?

Odpowiedź jest bardzo prosta. Obydwa języki są zbudowane według całkiem różnych systemów. Schlejer wymyślił naprzód reguły gramatyczne z potem słowa, którym musiał nadawać odpowiednie formy, aby je mógł nagiąć do gotowych gramatycznych końcówek, prefiksów i sufiksów. — Dr Zamenhof przeciwnie, naprzód ułożył słownik, nie wymyślając jednak słów, jak tamten dowolnie, lecz biorąc je z głównych języków świata, upraszczając tylko ich ortografię i wyrzucając synonimy, a potem starał się wyszukiwać odpowiednie gramatyczne końcówki także międzynarodowe. Dlatego Esperanto jest prawdziwym językiem między-

»Balsetelul binom begin nifatima, kilul flolatima. Söl at ölifom yelis ans in Lusän e Flent, pükom lusäniko e flentiko«.

(Esperante.) Decembro estas komenco de la vintro, marto de la printempo. Tiu ĉi sinjoro vivis kelkajn jarojn en Rusujo kaj Francujo, li parolas ruse kaj france«.

Nun ni transiru al vortaro.

Oni eble ne povus trovi pli bonan metodon por konvinki ĉiun nove varbotan esperantiston pri grandega diferenco inter ambaŭ lingvoj, ol donante al li la eblecon mem juĝi. Por tio volu vi montri la sekvantaj liniojn enhavantajn vicon da volapikaj vortoj kaj poste ilian tradukon esperantan. Mi estas certa, ke ĉiu mezoinstruita homo konfesos, ke li de l' unuaj malmulte komprenas, dume kontraŭe la sekvantaj estas preskaŭ ĉiuj pli malpli kanataj.

1. Balsul, 2. begön, 3. bel, 4. benovip, 5. blod, 6. cem, 7. depad, 8. dentiko, 9. dokel, 10. döł, 11. hol, 12. kil, 13. jireg, 14. lekanel, 15. leül, 16. lol, 17. Löstakin, 18. planov, 19. tenüp, 20. vadat, 21. zied, 22. zigad e. c.

(Esperante:): 1. Oktobro, 2. peti (la vorto peticio estas internacia) 3. monto, 4. gratulacio, 5. frato, 6. ĉambro, 7. depeŝo, 8. germane, 9. doktoro, 10. ideo, 11. horo, 12. tri, 13. reĝino, 14. artisto, 15. oleo, 16. rozo, 17. Austrujo, 18. botaniko, 19. eterneco, 20. kvadrato, 21. citriono, 22. cigaro.

Kiel do unu aŭtoro por samaj objektoj uzis nomojn tiel diferencajn de l' uzitaj de la dua aŭtoro, kaj kial la unuaj esprimoj estas aŭ tute ne, aŭ nur malfacile kompreneblaj, dum la duaj estas preskaŭ konataj? La respondo estas tre simpla. Ambaŭ lingvoj estas konstruitaj laŭ du tute malsimilaj sistemoj. Schlejer elpensis unue la gramatikajn regulojn kaj poste la vortojn al kiuj li estis devigita doni formon oportunan por siaj jam pretaj gramatikaj finiĝoj, prefiksoj. Dr. Zamenhof kontraŭe verkis unue la vortaron ne elpensante la vortojn laŭvole, sed prenante ilin el la ĉefaj lingvoj (ŝanĝante nur iom ilian ortografion aŭ por eviti sinonimojn) kaj al tiuj ĉi, per si men internaciaj vortoj, li poste penadis elserĉi konvenajn kaj ankaŭ internaciajn gramatikajn finiĝojn. Tial Esperanto estas vera lingvo internacia.

En Volapik' ni vidas tiel grandan emon pli mallongigi la vortojn, ke fine vortoj ĉe



narodowym. W języku »Volapük« widzimy tak wielką skłonność do skracania wyrazów, że nawet wyrazy międzynarodowe stały się niezrozumiałe: np. bib (biblia), fed (federacya), fluk (frukto = owoc), gad (gardeno = ogród. ang. garten, niem Garten, franc. jardin), gam narzeczony, z zniem Bräuti gam) kadem (akademia), klig (z niem. Krieg), lazet (lazaret), pöp (papier i t. d.

Według zdania volapükistów ich język jest bardzo dobrym, ponieważ »czas to pieniądz«, a oni oszczędzając na literach, oszczędzają czas czytającym. Na to ja mogę znowu odpowiedzieć, iż jest to złudzenie myśleć o oszczędzaniu czasu pisząc np. Söl N. N. plofed nivela ekömom se Täl, zamiast po esperancku Signoro N. N. profesoro de l' universitato venis el Italujo, albowiem używany czas przez napisanie mniejszej ilości liter, czytający straci i jeszcze dołoży, szukając tych koślawych słów w słowniku, podczas gdy tekst ten esperancki i bez słownika zrozumie. Jak widzimy, słownik »Volapüka« składa się albo z przekręconych i skróconych słów istniejących w innych językach, albo z dowolnie wymyślonych słów i dlatego jest prawie niemożliwem wyuczyć się tych słów i zapamiętać je. I to było także jedną z głównych przyczyn upadku »Volapüka« jak również tego bardzo znamienego faktu, że ani jeden esperantysta nie został volapükistą, podczas gdy tysiące volapükistów, a nawet całe kluby uznały wyższość »Esperanto«, przechodząc pod nasz zielony sztandar.

internacjaj farigis nekompreneblaj, ekz: bib (biblio), fed (federacio), fluk (frukto), gad (gardeno), angle: garden, germane: Garten, france: jardin jarden), gam (fiando, mallongigita el germana: Bräuti-gam!), kadem (akademio), klig (milito, el germana: Krieg!) laret (lazareto) pöp (papero) k. t. p.

Laŭ opinio de volapikistoj ilia lingvo estas bonega ĉar, »tempo estas mono« kaj ili, ŝparante literojn, ŝparas tempon al legantoj. Sed ni povas kontraŭdiri, ke estas iluzio pensi pri ŝparo de tempo skribante ekz. »Söl N. N. plofed nivela ekömom se Täl« anstataŭ »Sinjoro« N. N. profesoro de l' universitato venis el Italujo«, ĉar la gajmintoj tempon da kelkaj literoj la legantoj kelkfoje perdos serĉante la kripligitajn volapikajn vortojn dum la esperanta teksto estas sen vortaro komprenebla.

Kiel ni vidis, konsistas la volapika vortaro aŭ el tute malsimiligitaj diverslingvaj (precipe germanaj) aŭ laŭvole elpensitaj vortpartoj kaj tial estas preskaŭ neeble el-lerni kaj memori ilin.

Tio ĉi estas ankaŭ la ĉefa kaŭzo de falo de Volapik' kaj de tre rimarkinda fakto, ke eĉ unu esperantisto ne farigis volapikisto, dum multoj eĉ tutaj kluboj da volapikistoj konfesis la plibonecon de Esperanto kaj aliĝis sub nian verdan standardon.

S. Schels  
E. 3747.

## Duoble ruinigito.

(Historio pri »brilanta afero«.)

Tiu ĉi originalan skizon,  
neindan frukton de miaj studoj kaj ekzercoj  
en Esperanto,  
mi dediĉas al tre estimata Instruanto  
S-ro St. Lazica.

*Helena Hempel.*

Juliano M. estis nobelido.

Se mi komencas per tiu memorigo, mi ne celas dependigi de tiu privilegio, lian pli grandan aŭ plimalgrandan indon, sed, ĉar la nobeleco ekludis eminentan rolon en lia vivo, mi ne povas ĝin preterlasi.

Laŭ rakonto de liaj konatuloj, Juliano estis siatempe, bela, rozvanga, mallumokula, kun korvoniĝa liphareto kaj belkreska junulo.

Rapide tamen pasis lia juneco. Inter voluptaj mondentotoj kaj diboĉaj virmanieroj,

kiuj eksuperregis lian molan karakteron, Juliano perdis multe de spirita kaj korpa sano; multe — preskaŭ ĉion. Li farigis — ruino de homo.

Kiam mi lin ekkonis, li estis en aĝo de ĉirkaŭ kvardek jaroj. Tiu renkontiĝo okazis en unu el nemultaj domoj, kiujn li elektis por siaj periodaj vizitoj, ne havante jam iajn vivrimedojn.

Li estis do parazitulo. Ĉiam en disŝiritaj vestoj (se oni lin ne estus kovrinta per io pli ordeta), ĉiam suferanta malvarmon (eĉ en varmaj somertagoj), ĉiam malsatega, Juliano, antaŭ ĉio havis preskaŭ senfinan — soifon. Se li prosperis iaforte ĝin estingi, tiam la malsobreco ekkurbigadis lian eluzitan vizaĝon kun surkurigitaj per sango



okuloj, kun svelita, blua nazo, kun profundaj sulkoj tranĉantaj vertikale liajn diversĝintajn vangojn kaj kun esprimo de cinika apatio. Li balbutis tiam senlige vortojn (eldiraditajn de li eĉ en sobra stato, tre malprecize, malkompreneble kaj kun gorgsonanta voĉo, kies kaŭzo estis ia pesta malsano alhavigita dum eksterlanda estado), kaj lia figuro fariĝadis tiel repuŝanta, abomena, ke la plej fervora filantropo estus treminta je lia vidaĵo, antaŭ ol esti elten-dinta al li la manon, por lin komplete sublevi.

Oni rakontis, el tempoj de lia juneco, pri ia beleta, deksepaga Emnjo, filino de librobindisto, kiu lin, kiel multajn aliajn, trompetis, kaj forlasis lin fine kun malplenigitaj poŝoj. Li rememoradis ŝin ankoraŭ, sed jam nur ĉe la pokalo.

Juliano sopiris konstante je la estinteco (ĉu tio estis do mirinda?), malbenis sian sorton kaj revis pri materiala plibonigo, sed ĝin jam nenial esperis. Ĉiuj pensis ankaŭ, ke la vivo de tiu ĉi netaŭgulo ruliĝados samkure ĝis sia limo — dume...

Unu franca devizo diras: — »Havu nur tion certa, kion vi ne esperas«. — Rilate al Juliano, tiuj ĉi vortoj efektiviĝis en sekva maniero:

Kiam li en unu vespero, alvenis piede, — kiel kutime, — al unu el vizitataj de li domoj, la mastro diris al li:

— Vi havas tie ĉi leteron, kiun antaŭ kelkaj tagoj, oni enmanigis al mi, por ke mi ĝin redonu al vi. Mi ne serĉis vin, sciante, ke vi iatage tie ĉi aperos. Rigardu do, vidu, ke mi ne ŝercas, — aldonis sinjoro T. vidante ian malkredemon sur la vizaĝo de l' alveninto, — kaj donis al li grandan koverton, sur kiu vidigis per elsvinga skribmaniero, skribita adreso: — »Al sinjoro Juliano de M. kune kun leteroj de sinjoro Trytovski en Biberovka, poŝto R.«

Juliano silente malfermis koverton kaj komencis legi. La estingitaj okuloj ekvivigis. La enhavo de letero estis jena:

»Sinjoro! Se vi deziras ekakiri grandan monsumon, volu senprokraste sciigi min, kiam ni povos interkunveniĝi, koncerne tiun aferon. Persono mi klarigos al vi pli precize ĉion.

Gabrielo Fritzler advokato en S.«

— Ha, tio ĉi estas vere grava kaj urganta, — diris Juliano, sed detenis sin nomi la enhavon. Li prenis tuj leterpaperon kaj komencis per tremanta mano, skribi respondon. Ĝi estis mallonga; li sciigis nur,

ke post du tagoj li estos alveninta preparoli la aferon.

Li petis sinjoron Trytovski pri ia nedisŝirita vestgarnituro kaj botoj, por povi sin montri en la urbo, pri ĉevaloj li petis ankaŭ kaj en difinita tago li aperis ĉe la advokato.

S-ro Fritzler ĉirkaŭmetis lin per sia rigardo, de piedoj ĝis kapo — kaj invitinte lin sidigi, demandis:

— Ĉu vi alportis viajn legitimaktojn?

— Mi portas ilin ĉiam kun mi — jen ili estas.

— Bone, mi trapenetros ilin..... Baptatesto... diversaj aliaj dokumentoj..... sed kie estas la nobeldiplomo?... ĉar tio ĉi estas la plej grava... Aha! ĝi estas... ĝi estas — parade! — »Juliano M. de insigno Poraj...« jen, tion ĉi temas! Ĉio estas en ordo. Nun, vi devas sciigi, pri traktota objekto.

— Ĝus, mi atendas, kiam vi pri ĝi min komprenigos — respondis Juliano jam iom nepacienca.

— Do, aŭskultu min, sinjoro... unu brilanta afero sin prezentas al vi... Vi estas needzigita? Ne vere?

— Jes, sed kion tio ĉi rilatas?

— Mi volas ĵus al vi ĉion mallonge ekklarigi: Jen, unu fraŭlino, — de kie kaj kianome, devas al vi esti ĉial indiferenta — deziras ŝanĝi sian familian nomon, seninsin-gnan, kontraŭ la nobela. Tio ĉi estas al ŝi necesa por la vivo en mondo. Estante riĉa, ŝi oferas 30,000 koronojn al tiu, kiu je ŝi edziginte, rifuzigos samtempe ĉiujn aliajn al ŝi pretendojn. Oni serĉadis pri iu konvenbla... mi aŭdis pri vi, kaj pro tio ĉi, mi faras al vi la proponon en nomo de tiu fraŭlino.

Juliano, kiu aŭskultante, senspiriĝis, nun diris:

— Nu, sed kiel, poste vivi kun ŝi... en disiĝo?

S-ro Fritzler voletis respondi per la demando:

— Ĉu vi pensas ja, sinjoro, ke ŝi konsentus vivi kun vi?

Sed sindeteninte de moko, li diris grave:

— Tute. La edzigo okazos en loko, kiun mi poste al vi nomos. Tien vi alvenos en difinita tago kaj horo; alvenos tien ankaŭ la fraŭlino kun atestontoj. Post la ceremonio, vi disveturos gesinjoroj en du flankojn, por neniam vin revidi, nek renkonti. Ĉu vi komprenis, sinjoro?

Juliano sentis jam ian kapturnon



Advokato ne atendente lian respondon, daŭrigis:

— Mi legos tie ĉi al vi la punktojn de la skriba kontrakto, kiun vi subskribos en okazo de jesa decido pri kiu mi ne dubas. Vi promesos kontrakte ne koni vian edzinon eĉ, ne peni pri ekscio de ŝia nomo, ne serĉadi ŝian personon aŭ ŝian estejon; vi konsentas la edziĝon sub tiaj kondiĉoj, kiujn ŝi lasis al vi prezenti, t. e. pro la rekompenco de 30,000 kor. kiujn vi baldaŭ post la edziga ceremonio ricevos de miaj manoj, je la speciala kvitanco. Nu, kion vi diros? Sendube, vi konsentas?

— Sed kial tiu stranga dispo, fari ĉion tiel sekrete?

— Ne faru nur rimarkojn; ĉi tio estus vane: Jes, aŭ ne; — oni devas decidigi. Do, vi subskribos?... Tia sumo falas sur vin!... Tie ĉi oni ne devas mediti.

Juliano jam de longe same en animo disjugiĝis, kvankam tio ĉi iom malklare al li ŝajniĝis... La kunigo per juro... Ĉu ĝi povus lin en io ĝeni?... Cetere, ĉu estus en mondo ia virino, kiu konsentus aligi ŝian sorton al li, tia, kia li nun estas?... Krom tio, la ĉefa objekto, t. e. la mono, allogis lin... Ho, Julĉjo, nun vi ĝuos... vi ĝuos!...

Li prenis la plumon kaj fobre la akton-subskribis.

— Tie ĉi, vi havas ankoraŭ, kiel alidono, 400 koronojn por la nova kaj elegantaj vestaĵo de tiu ŝolena tago, — diris la advokato, enmanigante al li, nomitan sumon en koverto.

— Krom tio, ankoraŭ unu, — sed ne kolerigu, — en tiu tago, detenu vin de drinkado pardonu min, sed mi aŭdis...

Juliano faris tiel solenan mienon, ke lia respondo ne estis jam necesa.

Ili disiĝis, dirante unu al alia: Ĝis revido!

La estonta »kapitalisto« mendis tuj ĉe la tajloro, botisto, k. t. p. Ĉion, kio estis necesega por ŝanĝigo de lia eksteraĵo en la tago grava. Poste, li eliris sur la placon, kie kaptinte unuan el renkontitaj konatoj, fortiris lin por drinki kune, konjakon. Eltrinkinte kelke da boteloj, ebria, li revenis vespere Biberovka'n. Oni rimarkis, ke krom malsobrecio, li estis nekutime radiantia. Juliano tamen siletis pri la kaŭzo.

Post dek da tagoj, li ricevis de l' advokato sciigon pri la termino kaj loko de estonta ceremonio. Porveturinte tre matene, jam per dungitaj ĉevaloj, li haltiĝis antaŭ en S. kie revestigita kaj frizita, li ŝanĝiĝis nerekonieble (frizisto ne malŝapis al li eĉ dikan tavolon de pudro). De tie li direktis sin al H. kiel loko elektita kaj signita al li en letero.

Estis nebula, malvarmeta mateno. Veturante envolvita per dika mantelo, Juliano konsideris kaprican sorton, kiu lin tiel afable prenis en zorgon, Traveturinte arbaron, li vidis starantan apud ĝia bordo, preĝejeton. Ĝi estis jam malfermita; nekonata al li pastro sidis en unu da benkoj.

Juliano jam de longe ne estis en preĝejo. Li sidiĝis je dua flanko, kaj meditis. daŭrigata

## Diversaĵoj

En monato julio okazis la jara kongreso de Sveda Grandlogiario de Bontemplanoj. Laŭ raporto de l' sekretario tiu ĉi Grandlogiario sukcesplene disvolviĝas kaj dum la lasta jaro aliĝis 20.000 anoj, inter kiuj troviĝas multaj eminentuloj: profesoroj, doktoroj, ingenieroj k. a. La nuna nombro de societanoj estas 180.000.

Ĉar unuflanke la programo de Bontemplanismo enhavas ne sole sobrecajn problemojn, sed ankaŭ siocialajn, klerajn kaj aliajn ĝeneralajn kaj aliflanke la Bontemplanoj tre ofte interrilatas kun samaj alilandaj societoj — tial la demando de helpa internacia lingvo lasttempe fariĝis pli aktuala.

Dank' al klopodoj de Sro Edv. Wawrinck, agema kaj fervora esperantisto, ellernis multaj Svedaj Bontemplanoj nian

karan lingvon. Dum la lasta jaro multaj esperantaj kursoj estis kun bona rezultato aranĝitaj en diversaj logioj de l' tuta lando kaj Esperanto fariĝis oficiala helpa internacia lingvo por la »Sendependa Logiario de Bontemplanoj.

Torsby, la 18an de julio 1906.

A. Roibard.

## La hinduja virino.

Sinjoro T. Adinarayana Chettiar, unu el la plej agemaj propagandistoj de nia lingvo en Hindujo kaj korespondanto de »Tra la Mondo« alsendis al ni sekvantan leteron.

»En respondo je la ĝentila kaj flatema invito de Redakcio mi skribas tinjn ĉi malmultajn vortojn pri virinoj en Hindujo, por ke niaj karaj fratinoj en malproksima Polujo sciuj, kiel vivas kaj kion faras iliaj fratinoj en l' antikva kaj fama lando de Hindujo.



Al la plimultoj de Europanoj nia lando ŝajnas esti sen civilizacio kaj sekve niaj virinoj preskaŭ sovaĝaj. Kvankam tro multe de la virinoj en Hindujo ne estas kleraj, ili sendube estas sinjorinoj de naturo. Zorge instruataj de pliagulinaj, ili farigas bonaj edzinoj kaj patrinoj. Nia knabino jam de la kvina aŭ sesa jaro lernadas la detalojn de la hejma administrado, la arton de kuirado, utilajn kudrilverkojn k. t. p. Sia propra sekreto estas la kudrado de la simplaj sed brile koloritaj vestoj, per kiu ŝi kovras sian gracion korpon sen la helpo de la tajloro en maniero, kiu elvokas la senliman admiron de l' fremduloj.

Ŝi ne legas ĵurnalojn: la komuna akvujo aŭ pli bone la vilaĝa rivero, kie la virinoj kunvenas matene kaj vespere, servas kiel klubo, kie estas diskutataj la ĉiutagaj okazaĵoj. Tie ĉi sub la brila ĉielo, glorigita per la subiranta tropika suno, ili amas prokrasti, ĝis la sonoriloj de malproksima templo sendos al ili dolcan admonon, ke jam estas tempo por deziri bonan nokton.

T. Adinarayana Chettiar

Esp. Nr. 8392

Salem, Hindujo.

## Miksajoj

*La pli bona metio.* La sveda reĝo Adolf Frederik, kiu tre volonte okupis sin je tornistaj laboroj, donacis foje al angla marŝalo Hamilton dum lia vizito en Stokholmo lignan de si mem tornitan tabakujon.

»Mi tre dankas al Via Reĝa Moŝto« diris la marŝalo akceptante la tabakujon, »sed mi pli volus, se Via Moŝto estus ellerninta pli bonan metion, ekzemple, se Vi farigus orajiston«.

*Respondo.* La franca verkisto Cr billon, kiu skribadis tre malprofundajn romanojn, diris foje al Rousseau, ke sia eldonisto en la lasta monato disvendis jam kvar eldonojn de sia plej nova romano, dum la eldonisto de la »Nova Heloise« de Rousseau ne vendis e  unuan eldonon. »Jes« respondis trankvile Rousseau, »oni ja povas esti certa, ke ĉiujare centmilfoje pli da glanoj estas mangataj ol da ananasoj — sed kiu ilin mangas?»

I.

Faru ok vortojn konsistantajn el la sekvantaj 54 literoj: aaaaa ddd eeee f g h iii jj kkkkkkk ll m nnn ooo ooo oo p rr rrrr u v z

La signifo de l' vortoj estas: 1) floro, 2) skribilo, 3) lumigilo, 4) arbo 5) birdo, 6) du birdoj, 7) besto, 8) trinkaĵo.

La triaj literoj de tiuj ĉi vortoj, legitoj de supre suben donas nomon tre konatan al ĉiu esperantisto.

## De la Redakcio

Konate estas, ke agante kune kaj reciproke sin helpante, oni povas pli facile kaj pli rapide atingi ion, kio vidigas por la unuo ne atingeblaĵo. Ĉi tiu magia vorto »kune« devas havi por ni, venkontaj multajn malfacilaĵojn kaj malhelpaĵojn grandan signifon. Ni devas nepre ne distradi, sed kontra e koncentrigi niajn fortojn, unuigi niajn penojn, por ebligi sisteman kaj elikan laboradan. Ni pensas nome, ke estus dezirinde krei laŭ la angla modelo, ligan de galiciaj societoj, asocion, kies komuna orĝano estus »Pola Esperantisto«.

Tiamaniere oni povus plifaciligi pli oftan eldonadon de gazeto, pligrandigi ĝian amplekson kaj per la samo fari la organon pli ĝenerala kaj pli interesiga. Manieron, per kiu oni povus tion aranĝi mi lasas al publika diskutado. Nature ne temas tie ĉi pri ia supremo de unu aŭ alia societo, ĉar ni ĉiuj havas saman celon kaj servas al sama ideo: kaj la konkurado en nobla afero estas ĉiam dezirinda — sed pri plifaciligado de l' komuna laboro. Ni petas do konsideri tiun ĉi proponon kaj partopreni en skriba diskutado pri ĝi, — ĉu per artikolo en sekvota numero, ĉu per leteroj alsendotaj al redakcio de »Pola Esperantisto«, kaj aperigi proprajn projektojn.

Por iniciati la komencon, ni proponas jenon: ĉiuj societoj en Galicio — cetero, tute memstaraj — formas asocion, sur kondiĉoj difinitaj. Ili eldonas komunan organon kaj partoprenas en eldonajaj elspezoj rilate al nombro de siaj anoj. Tiamaniere kun pligrandigo de nombro de l' societoj malpligrandigus kostoj kaj per tio profitos ĉiuj societoj egale.

Samtempe ni sciigas, ke ni malfermas specialan fakon por dezirotaj iaj ajn demandoj, sciigoj kaj diskutoj, koncernantaj nian aferon.



## Stanisław Schels

Łwów — (Leopolo) — Austrio,  
Teatralna 21.

deziras interŝanĝi vidaĵokartojn  
kun eksterlandaj geesperantistoj.

Dezirantoj korespondadi por ekzerca-  
do bonvolu skribi sub adreso: Esperan-  
tistino »A. B.« Societo »Esperanto« en  
Lvovo, Ossolińskich 13. — Austrio-Galicio.

## Rekomendinda propagandilo

Arte ilustritaj vidaĵokartoj, eldonitaj de S-to  
esp. en Krakovio po 6 h unu riceveblaj ĉe  
ni, aŭ en Krakovio.

## MARYAN DZIKOWSKI

Łwów — (Leopolo) — Austrio,  
deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj  
poŝtkartojn.

## Do nabycia w redakcyi „Pola Esperantisto“

Gramatyka języka Esperanto (W. Skalski)	— 50 K
Vortaro esperanta-pola (St. Łazica)	— 40 „
Słownik polsko-esp. „ „	— 40 „
Pola Antologio	2 — „
Fundo de l' mizero (Sieroszewski)	0 75 „
Interrompita kanto (Orzeszko)	0 75 „

## Germana Esperantisto.

Monata organo de germanlingvaj gru-  
poj, redaktata esperante kaj germane.  
Enhavo propaganda, kronika, lite-  
ratura.

Abonprezo por ĉiuj landoj Mk. — 3.  
Rb. 1 50.

Admin. kaj Red. Berlino.  
Prinzenstrasse 95.

## „Ruslanda Esperantisto“

Ĉiumonata organo Esperantorusa de la  
S-to „Espero“. — Vasta kaj varia ma-  
terialo pri la problemoj kaj movado de  
Esperanto. Social-politika fakoj. Verkoj  
de gloraj modernaj beletristoj. Deta-  
laj prospektoj riceveblaj senpage. La  
jara abonpago (kune kun membrigo  
en la S-to »Espero«) — 3 rubloj  
(8 koronojn). Adreso: Ruslando, St.  
Petersburgo, B. Podjačeskaja, 24, en  
la S-to »Espero«.

## „TRA LA MONDO“

Tutmonda multilustrata Esperanta revuo.

Kunlaborado plene internacia pri la sekvantaj temoj:  
nuntempoj, arto kaj literaturo, sciencoj, ko-  
merco, industrio, militistaro kaj maristaro.  
teatro, sportoj, virina kaj gejunula pago, fe-  
lietono, ludoj, konkursoj kun valoraj monaj  
premioj.

Ĉiuj artikoloj estas verkitaĵoj de Kompetentuloj  
kaj anoj de l'landoj aluditaj. Grava fakoj por  
ĝenerala politika informado.

Eliras je la fino de ĉiu monato.

Jarabono: 8 fr.; kvaronjare 2 fr. 25 c., per monpapiro.  
Administracio: Mendon, (S-O), France. Oni povas sin  
turni al »Pola Esperantisto«.

»Por helpi al la propagandistoj, la Fermo  
Hachette k. K.“ ĵus eldonis serion da bilda-  
roj (25 malsamaj numeroj), tute en Espe-  
ranto, por infanoj.

»Ni varme rekomendas al niaj legantoj  
tiun ĉi novan kaj tre malmultkoston propa-  
gandan rimedon. Per ili, ankaŭ, la profes-  
oroj facile povos paroligi siajn lernantojn  
(ekz. priskribigi ĉiun bildon). La Bildaroj  
estas aĉeteblaj en ĉiuj librejoj kaj paper-  
vendejoj«.

**LIBRAIRIE HACHETTE & C<sup>ie</sup>**  
79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79.



Numera okazowe na żądanie gratis i franco.

# „PRZEMYSŁOWIEC” Tygodnik popularny dla wszystkich

(dla spraw przemysłu techniki i handlu)

WYCHODZI WE LWOWIE OD ROKU 1903 W KAŻDĄ SOBOTĘ RANO  
pod redakcją inż. cyw. Edmunda Libańskiego.

Lwów:

Warszawa:

ul. Akademicka 1. 26. Telefou Nr. 806. — Zastępstwo na Król. E. Wende i Sp.

**Prenumerata:** kosztuje miesięcznie 1-20 K. = 70 kopiejek, kwartalnie 3-50 K. = 2 ruble.

„Przemysłowiec” jest pismem popularnem dla wszystkich, podaje bogatą postępową treść z różnorodnych działów rozwoju techniki i przemysłu. pomieszcza artykuły dotyczące rozwoju przemysłu artystycznego, oraz obfitą kronikę techniczno-przemysłową. Pomieszcza stały dział Esperanto, w którym informuje o rozwoju języka międzynarodowego oraz prowadzi dział dla Turystyki.

W odcinku pomieszcza „Przemysłowiec” ilustrowane fejetony „Z postępów techniki i przemysłu” pióra E. Libańskiego.

**Nowi abonenci** otrzymają gratis „Ze światła postępu techniki i przemysłu” (ilustrowane szkice popularne) Edmunda Libańskiego.

Dotychczas wyszły: 1. Postęp techniki wojennej. 2. Podbój atmosfery. 3. Technika w boju o światło. 4. W krainie szkła i jedwabiu. Perpetuum mobile. 6. Nafta i naftciarze.

Główny skład wydawnictw Towarzystwa „Esperanto” we Lwowie księgarnia

**K. Altenberg, Lwów.**

**Pierwsza galicyjska fabryka  
bielizny i kołder**

pod firmą

**Unua galicia fabriko de  
tolaĵo kaj litkovriloj**

sub firmo

Lwów, plac Kapitulny 3.

**Wiktor Sedlaczek**

Lwów, plac Kapitulny 3.

poleca

z najlepszych materyalów starannie wyrabianą bieliznę damską, męską, dla dzieci i niemowląt.

**Całe wyprawy ślubne. — Wyprawkę dla niemowląt.**

Kołdry wełniane i puchowe.

Ceny stałe a niskie. Cenniki dostarczam gratis. Wszelkich informacji udzielam chętnie.

rekomendas

tolaĵon virinan, viran kaj infanan zorgeme fabrikitan el plej bonaj materialaĵoj.

**Kompletaĵ edzigaj dothavoj.**

Dothavetoj por suĉinfanoj. Lanaj kaj lanugaj litkovriloj. Fiksaj kaj moderaĵ prezoj. Prezaroj senpage kaj afrankite.

Ĉiuj informoj volonte donataj.

Oni korespondas ankaŭ esperante.